Bremen

Informilo 296

Esperanto-Grupo Bremen

Oktobro 2011 - Aprilo 2012

Bremen

Zamenhoffesto la 9an de decembro 2011

Ĉifoje la geesperantistoj el la grupoj de Bremeno kaj de Subvisurgo estis invititaj de familio Kruse el Lemwerder.

Foto: Franz Kruse

Kunvenis entute 10 personoj por gaja babilado, trinkado de diversaj specoj da teo (kun aŭ sen rumo), gustumado de kristnaskaj frandaĵoj kaj fine por komuna foto, kiu konservu la belan etoson de tiu ĉi vespero. Ni kore dankas al Elisabeth kaj Franz, kiuj tiel bone regalis nin. Ni adiaŭis per "ĝis la venonta jaro", ĉar ni ĉiuj ĝojas revidi nin en grupvespero aŭ iu alia aranĝo.

Hellmut Grebe

Prezidanto: Hellmut Grebe, Bremerhavener Straße 112, 28219 Bremen, Tel. 0421-39 63 480
Kasistino: Ruth Bohn, Helgoländer Straße 58, 28217 Bremen, Tel. 0421-38 27 15
Redaktisto: Dr. Markus Beckmann, Rüdesheimer Str. 7, 28199 Bremen, Tel. 0421-397 78 77

02.07.2011 Ĝardenfesto ĉe familio Grebe.

Ĉiuj el la grupo estis invitataj partopreni al la festo en la ĝardeno malantaŭ la domo.

Time ni observis la veteron, ĉar malhelaj nuboj malalte kovris la ĉielon. Tamen, ĉiuj atenditaj partoprenantoj venis, por kune travivi agrablan kunvenon. Je la 16a horo venis sub pluvombreloj la unuaj. Pro la malvarmo, pluvo kaj forta vento ni ne povis sidi en la ĝardeno. La balkono estis nia fuĝejo. Nur la rostforno devis funkcii en la ĝardeno.

Ne daŭris longe, ĝis kiam la balkono estis plenplene okupata. Hellmut kuraĝe rostis la viandaĵojn. La tablo estis delikate aranĝita. Ni laŭdis la lertan dommastrinon. Mankis nenio, eĉ ne la bona humoro. Bonapetite ni manĝis, kion Hellmut rostis.

Kiam la forta vento blovis la pluvon eĉ en la balkonon, ni devis fuĝi. La kunvenon ni daŭrigis en la salono. Multaj ĉeestantoj povis gaje rakonti. Tie la lasta parto estis ankaŭ agrabla okazaĵo.

Vespere ni adiaŭis kun granda danko al Dagmar kaj Hellmut, kiuj tre sukcese aranĝis tiun eksterordinaran kunvenon.

DANKON!

Dieter Hartig

03.09.2012 Ekskurso al Hamburgo

La 3an de septembro 8 membroj de la bremena kaj la subvisurga grupoj vojaĝis al Hamburgo. Kune kun la Hamburgoj ni estis ĉirkaŭ 20 esperantistoj, kiuj sekvis la tre interesan gvidadon de Kerstin tra la stokeja kvartalo kaj tra la nova kvartalo „HafenCity". Ni vidis tie multajn ege interesajn kaj eksklusivajn konstruaĵojn kaj ankaŭ multe da konstrulokoj, ĉar la HafenCity ankoraŭ kreskas. Sub blua ĉielo ni ankaŭ povis vidi kelkajn grandajn ŝipojn sur la Elbo. Ni ankaŭ vidis la ege grandan kaj impresan konstrulokon de la Elbo-koncertdomo, de kiu oni ofte povis legi en la gazetaro pro la ĉiam kreskantaj konstrukostoj. Fine de la gvidado ni ŝipe veturis al Övelgönne kun sia muzehaveno - tie ni kafumis sur restoraciŝipo kun bela rigardo al la rivero Elbo.

Stefan Krieghoff (Fotoj kaj Teksto)

Informoj

Nekrologo

La 3an de Junio 2011 forlasis nin por ĉiam

Reinhard Lohmann

Li estis fidela kaj modesta membro de nia grupo. Dum la digna funebra ceremonio estis menciitaj liaj klopodoj por Esperanto kaj lia fiero pri la sukceso en la esperantlingva ekzameno.

Lia ĉeesto en niaj kunvenoj estis de ĉiuj tre ŝatata.

Li ripozu en paco.

Lisa kaj Dieter Hartig

Jarĉefkunveno

Am 15. Februar 2012 findet unsere Jahresversammlung im HOKI 58 statt. Die Tagesordnung sieht vor:

1. Begrüßung
2. Wahl des Protokollführers und Wahlleiters
3. Bericht des Schriftführers
4. Bericht der Kassiererin
5. Bericht der Revisoren
6. Entlastung des Vorstandes
7. Entlastung der Kassiererin
8. Neuwahl des Schriftführers
9. Wahl des Vorstandes und der Revizoren
10. Verschiedenes

Anträge und Änderungen bitte an Hellmut Grebe (Tel. 3 96 34 80)

Nia kalendaro

18.01.2012 20:00	**Grupvespero** Temoj estos: - rerigardo al 2011 - antaŭrigardo al 2012 - diversaj informoj pri esperantista vivo HOKI 58, Waller Heerstr 58
15.02.2012 20:00	**Jarĉefkunveno 2012** Rilate la tagordon rigardu la rubrikon 'Informoj'. HOKI 58, Waller Heerstr 58
14.03.2012 20:00	**Grupvespero** kun **Hellmut Grebe** Temo: Bildoj de bicikla veturado laŭlonge de sep riveroj HOKI 58, Waller Heerstr 58
18.04.2012 20:00	**Grupvespero** Temo ankoraŭ ne fiksita. HOKI 58, Waller Heerstr 58